

la informilo

ISSN:
0291-
6037

INFORMBULTENO  PRI ESPERANTO

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

NOUVELLE SERIE
trimestriel
1er trimestre 1990
N° 69



ABONNEMENT
un an: 45 FF

jara abono
por eksterlando:
57 FF aŭ 15 R.K.ºj

ANTO-FLASH... ESPERANTO-FLASH... ESPERANTO

UN NOUVEAU PRINTEMPS pour les espérantistes roumains

Ce n'est pas sans émotion que les pratiquants de la Langue Internationale ont accueilli les premières missives de leurs correspondants roumains, rédigées en toute liberté.

Tous les lecteurs de "La Informilo" seront au rendez-vous de la solidarité...



*hierai, kune kun viaj leteroj mi
ricevis de la Universitato el Timișara "Vokon" de la Kolekti-
vo de Esperanto kaj Interlingvistiko, kiu invitas min
kaj la sibianojn esperantistojn reorganizi la E-sandon kaj
E-kursojn, kaj partopreni la 3-an de junio al Ĝenerala Kun-
veno por refondigi la Esperanto-Asociacion el Rumanio (EAR).*

... "Hier, en même temps que vos lettres, j'ai reçu de l'Université de Timisoara un "appel" du Collectif d'Espéranto et d'Interlinguistique, qui m'invite ainsi que les espérantistes de Sibiu à réorganiser le groupe et les cours et à participer le 3 juin à une rencontre générale pour refonder l'Association Espérantiste de Roumanie (E.A.R.)."

Esperanto et solidarité

« Nous sommes restés cinq jours et cinq nuits à la cave, sans eau et sans électricité... Au-dessus de nos têtes, le sifflement des balles et le grondement de la canonnade... »

C'est par ces quelques phrases au verso d'une carte postale rédigée en esperanto que Vasile Albu annonçait que toute sa famille avait échappé aux combats meurtriers dont la ville de Sibiu, fief de Niku Ceaucescu, avait été le théâtre durant plus d'une semaine.

Vasile n'est pas un inconnu pour le club d'Esperanto de Bar-le-Duc : voici deux ans, il avait en effet réussi à prendre maintes difficultés à rendre visite à sa correspondante de Fains-Véel, Mireille Dillenschneider. Lors de son séjour, il avait pu témoigner des conditions incroyables dans lesquelles vivaient ses compatriotes et traduit son émotion de pouvoir « respirer un peu de liberté », selon ses propres termes. Il n'avait pas de surcroît caché le plaisir qu'il éprouvait de pouvoir converser en esperanto, langue prosaïquement par Ceaucescu, lequel avait imité en cela les interdictions promulguées en leur temps par Hitler, Staline et Salazar. Avant son retour à Sibiu, Vasile avait tenu à se faire photographier près d'une borne commémorative de la Voie de la liberté, lors d'une visite à Verdun.

Kara Mireille, Sibiu, 28.12.89

Post ses Tagoj kaj ses noktoj, bari kaditaj en nia domo en kelo, sed pluvo de klugoj kaj tondro de kanonoj, lumo, gaso k. akvo, ni sukiesis resti bone, niuj. Ni havis malrican kaj maltrankvilan Kristnaskon sed kun ĝojo por la libereco gajna. Ĉu vi ricevis mian bondeziraĵon? Mi atendas la leteron de vi kaj pol vivu la libereco! Vante

*Vasile Albu, Eroilor 9
2400 SIBIU, Rumanio.*

Destinator: *Siniorino Mireille Dillenschneider*
Rue de la Chalade, 6
Strada
Blocul: *Score* Etajul
Sectorul: *Judetul*

CODUL: *5500c* LOCALITATE: *FAINS-VEEL*
Tara de destinatie: *Franta*



Parrainer une famille

C'est donc tout naturellement que les membres du club, lors de leur récente soirée annuelle, ont décidé de parrainer la famille Albu, attestant ainsi concrètement de la solidarité agissante de tous les esperantistes qui ont le privilège de tisser des liens spécifiques avec leurs amis pratiquant la langue internationale.

Près de quarante kilos de produits de première nécessité ont été collectés lors de

cette soirée et acheminés tout aussitôt vers Sibiu, avec l'aide désintéressée du ministère des Postes et Télécommunications qui offrait la gratuité des envois directs à des familles roumaines.

Le club se promet par ailleurs de faire parvenir à Vasile ultérieurement, un colis d'ouvrages, revues et journaux en esperanto, ainsi qu'un stock de manuels d'étude, puisque désormais, la langue internationale qui avait connu un grand essor en Roumanie va de nouveau pouvoir être enseignée et pratiquée sans restriction aucune.

L'ESPERANTO NE PLAÎT PAS AUX DICTATEURS...

Henri Fischer-Galati, un grand industriel polyglotte parlant 7 langues, outre le roumain et l'esperanto, organisa les premiers cours à partir de 1904, puis le mouvement espérantiste roumain avec le bactériologue Gabriel Robin.

La Roumanie a donné des noms immortels au monde espérantophone, notamment Andreo Cseh (créateur d'une remarquable méthode d'enseignement) et Tiberio Morariu.

Pourtant, malgré un accueil favorable, il n'est guère de pays où l'esperanto ait été aussi longtemps étouffé. Tout a commencé en 1928 avec une grave crise économique, puis politique marquée par la mainmise fasciste, puis la guerre. En 1947, l'Institut Roumain d'Esperanto fut légalement reconnu et la langue bénéficia d'une réelle sympathie de la presse, mais tout fut interrompu trois années après. En 1956, la fondation d'un "Comité d'Initiative pour l'Esperanto" et la reconnaissance de cette langue par l'Institut de Linguistique et l'Académie de Roumanie favorisèrent une nouvelle avancée, mais cette impulsion fut bloquée en 1960 par l'attitude d'une personnalité influente. Abusant de sa position d'académicien et laissant entendre que l'esperanto n'offrait aucun avantage, Alexandru Graur a joué, en Roumanie, le rôle négatif qu'Alain Decaux joue aujourd'hui en France.

S'attaquer ainsi à l'esperanto, alors que tant d'épreuves l'ont affaibli, c'est en définitive manifester un certain penchant à vaincre sans péril, à décocher le coup de pied de l'âne.

En 1978, à l'Université de Timisoara, la fondation du "Collectif Esperanto-Interlinguistique" comme section de l'Académie Roumaine des Sciences Sociales et Politiques permit d'obtenir l'autorisation d'enseigner l'esperanto dans les universités. Mais le manque de livres d'étude en limita l'application, malgré la sympathie qu'il suscitait et des dispositions pourtant plus favorables à son enseignement que dans beaucoup d'autres pays. Il fut tout de même enseigné à 2300 étudiants à Timisoara, Cluj-Napoca, Bucarest. Cet élan prit fin en 1982 avec la dissolution des clubs d'esperanto. Toute activité pour l'esperanto fut interdite à partir de 1986. Toute correspondance de l'étranger en esperanto était considérée comme suspecte. Elle exposait son destinataire à des perquisitions de la Securitate.

Ceux qui considèrent les esperantistes comme des illuminés démontrent avant tout qu'ils sont eux-mêmes mal éclairés...

Henri Masson



Vert-Contact

137

19 rue Titon, 75011 Paris, ☎ (1) 43 79 38 38

HEBDOMADAIRE - 3,50 F

N° 137 - du 6 au 12 janvier 1990

ISSN 0298-8089

ESPERANTO

Comme vous le savez déjà, la motion concernant l'utilisation de l'Espéranto dans les relations internationales des Verts, motion débattue à l'A.G. de Marseille, a été votée. C'est une décision politique majeure en matière de communication. Les Verts, et au-delà les ressortissants de tous les pays, pourront communiquer avec le reste du monde sans être obligés de passer par la langue d'une minorité, langue souvent difficile à maîtriser par des personnes dont ce n'est pas la langue maternelle. L'Espéranto connaît un développement important hors de nos frontières (Hongrie, Pologne

Tchécoslovaquie, Chine, Japon, Corée, Brésil, etc.). Ce développement est dû à sa neutralité et surtout à sa facilité d'apprentissage, sa richesse et sa précision d'expression (langage courant, littérature, sciences et techniques, etc). La facilité d'étude de l'Espéranto ne tient pas à une simplification du langage mais à la logique de ses structures rationnelles polyvalentes et à son faible nombre de règles grammaticales. Tous ceux qui sont intéressés par les cours, stages, applications de l'Espéranto ou par des informations générales peuvent contacter l'AVUE (Association des Verts pour l'Utilisation de l'Espéranto), c/o Jean-Luc MERMET, La Rivière, 71340 St-Bonny-de-Cray.

ALSACE

Et pourquoi pas l'Espéranto?

M. Robert Kueny de Bantzenheim a lu avec intérêt l'article de M. Derouineau de Richwiller, intitulé « l'enseignement des langues, vital pour l'avenir » et paru dans notre page du 12 décembre et en tant qu'usager de la langue internationale Esperanto voudrait donner son avis quant aux questions posées.

Le problème linguistique dans le monde devient effectivement de plus en plus aigu et M. Derouineau a parfaitement raison de préciser que 5% seulement de nos lycéens (donc des cerveaux relativement jeunes) parlent couramment une langue étrangère après sept années d'études c'est-à-dire env. 1500 heures. Par comparaison je dirai qu'à 42 ans (un peu tard hélas avec aussi un cerveau un peu plus fatigué) j'ai pu parler l'Espéranto correctement après 50 leçons d'une heure et demie.

Je suis conscient que l'anglais est très répandu dans le milieu commercial et technique et je suis obligé de m'en servir dans ma profession. C'est à partir de là que j'ai constaté quel est le génie de l'Espéranto dans le domaine des relations humaines, commerciales et techniques (facilité de prononciation à comparer avec l'anglais).

Sans vouloir être anglo-américophone, je pense que pour la sauvegarde et le respect des identités culturelles de chaque pays, il serait bon d'utiliser une langue communautaire neutre, mais M. Jospin a dit « niel » pour l'apprentissage dans les

écoles. Il joue la fermeture à l'époque de la prestroïka, pendant que les Anglais (oui !) et les Chinois peuvent prendre l'Espéranto en option en fin de cycle secondaire.

Demandez aux enfants du primaire de Bantzenheim avec quel enthousiasme ils ont pris contact avec la langue internationale ! Je suis scandalisé de lire que l'on essaie de faire parler l'anglais à l'école maternelle. C'est de l'intégrisme culturel, du prosélytisme ; après-guerre on a interdit aux Alsaciens de parler leur dialecte à l'école, aujourd'hui on en déclare la nécessité - autant qu'un jour on découvrirait la nécessité d'un langage clair et simple et je suis heureux d'y avoir contribué, mais il y a la politique de l'autruche...

Pourquoi uniquement parler de qualité de l'enseignement des deux côtés de la Manche et non pas aussi de celle de l'autre côté des Pyrénées, des Alpes et du Rhin ?

Lors de l'ouverture de l'Europe, les identités de plusieurs pays seront bafouées mais nous Alsaciens sommes au coeur de l'Europe et il est tout à fait nécessaire d'être bilingue. d'apprendre à l'école la langue

de nos voisins mais ne pas rendre homogène sur le plan international et privilégier, une autre langue nationale, je pencherai plutôt pour un moyen neutre pour ne pas être dominé par une autre culture nationale, qu'elle vienne de l'Oncle Sam, de Staline, de Khomeiny ou de Mao.

Je suis comme on dit un utopiste (à ne pas confondre avec illusionniste), il faudra encore attendre 200 ans avant que nos gouvernants, obnubilés par leur nationalisme obtu, s'en rendent compte ; il y a encore bon nombre de nos concitoyens qui calculent en centimes 30 ans après. Il est vrai aussi que les entreprises dépensent beaucoup d'argent pour un piètre résultat.

La CEE donne déjà la moitié de son budget uniquement pour les 72 traductions des 12 pays.

Il se crée de plus en plus de sociétés d'intermédiaires de commercialisation en langue internationale. Il y a beaucoup de choses que les gens ignorent dans le domaine de cette langue simple et facile...

Je vous donne rendez-vous à un autre forum, celui des associations à Mulhouse début février, place du 14 Juillet.

« Mi deziras al vi bonan ŝancon ».

Ce qui signifie « Je souhaite à vous bonne chance ».

LA LETTRE DE L'ESPERANTO

4 bis rue de la Cerisaie
75004 PARIS
tél(services)(1) 42 78 68 86
(infos) (1) 48 87 07 42
MINITEL : 3615 ESPERANTO

CENT ANS DE CHANSONS EN ESPERANTO : Sylla Chaves, de Rio de Janeiro (Brésil) vient de compiler 140 chansons du bout du monde ou originales, en complément de sa méthode pédagogique par le chant.

NOUVEAU JEU DE LETTRES : il s'appelle KREITO et il est hongrois. Avec des cartes, affiches et jetons il apprend à former des phrases en s'amusant. Edité par Panno/HEA, il est en vente à UEA au prix de 28,50 fl .

LE NOBEL 89 EN ESPERANTO : les espérantistes avaient pu dès 1985 apprécier le talent incisif du prix Nobel de Littérature 89, Camilo José Cela, en lisant " La famille de Pascal Duarte", qui retrace le monde cruel de la campagne dans l'Espagne de 1942.

DEUX CENTS LYCEENS MEXICAINS... attendent des correspondants . Agés de 16 à 18 ans, ils apprennent l'espéranto dans leur lycée, Institut Carlos Cracida à Oaxaca et aimeraient enrichir leur bibliothèque et trouver des correspondants .

COURS DE TRADUCTION SCIENTIFIQUE; à la Chaux de Fonds (Suisse) du 18 au 21 janvier, une douzaine de spécialistes travaille avec les linguistes du projet européen DLT pour la traduction automatique par l'intermédiaire d'une langue-pont (l'espéranto en l'occurrence). Rappelons qu'à titre "d'exercice", les chercheurs de la firme hollandaise BSO traduisent chaque mois "Le Courrier de l'UNESCO" en espéranto

EXPOSITION AU CRDP de GRENOBLE : du 4 au 25 janvier le Centre Régional de Documentation Pédagogique a présenté aux lycéens et écoliers de l'Académie une exposition sur la langue internationale. Le 15, une conférence-débat, animée par Jacques Joguin présentait à une centaine d'étudiants et professeurs de linguistique, les utilisations de l'espéranto dans le monde, ainsi que sa structure. Pour tout renseignement sur Grenoble et sa région: 76 90 67 33.

ASSOCIATED PRESS a envoyé le 16 janvier une dépêche d'une page sur le nouveau service Minitel de France-Espéranto, le 3615 ESPERANTO.

APRES LES VERTS, UNE AUTRE ASSOCIATION : samedi 20 janvier, Bernard Léger est intervenu à la demande de la jeune association Revia, pour parler des avantages de la pratique de l'espéranto, aux jeunes qui envisagent de parcourir l'Europe en vélo .

ESPERANTO-FRANCE à EXPOLANGUES: du 14 au 19 février, porte de Versailles, à Paris, le stand de France-Espéranto (C 17) accueillera les visiteurs autour de son programme audio-visuel. Jeudi 15, à 10.30, Pierre Janton, professeur de langue et littérature anglaises à l'université de Clermont II, fera une conférence sur " Langues et communication dans la Maison Europe: espéranto" .

CHAPLIN FACE A HITLER A TURIN : Chaplin aimait l'espéranto, Hitler l'a combattu. Pourquoi? Les hommes veulent surtout se comprendre. Tel est le thème de l'affiche éditée par le club d'espéranto de Turin, sur une vue du "Dicteur" où l'espéranto est la langue du pays imaginaire .

LE CHANGEUR DE BILLETS CONNAIT L'ESPERANTO : La Caisse d'Epargne de Belgique (ASLK / CGER) vient d'installer à Brugge un distributeur de billets qui acceptent les devises étrangères (européennes, dollar et yen) et les change en francs belges. Ce prototype délivre à la demande un reçu en espéranto .

PREMIER DISQUE ROCK EN ASIE CENTRALE : Le club d'espéranto de Samarkhnde (Ouzbekistan) vient d'éditer un disque de rock ainsi que des solos interprétés par les chanteurs de Cimbent .

CONCOURS POESIE-CHANSONS : à Bydgoszcz (Pologne) du 4 au 8 février vient de se tenir le 5ème concours de poésie et chansons en espéranto sous les auspices du Ministère Polonais de l'Education. Le concours était suivi d'un programme touristique et culturel.

CHRISTIAN RAGOT : HOMMAGE A ZAMENHOF : du 20 février au 11 mars lors du Salon des Artistes et Designers qui se tiendra au Grand Palais, un des maitres du design français, Christian Ragot ,rend hommage au créateur de l'espéranto, Zamenhof .

LES JEUNES AU BRESIL : dans les pays en développement, les moins de vingt cinq ans forment le gros des "troupes " des espérantistes . Les jeunes Brésiliens se sont réunis en congrès à Campina-Grande du 4 au 9 février .

RADIO-VATICAN VERS L'AFRIQUE ET L'EUROPE : Radio-Vatican émet vers l'Afrique en espéranto le dimanche sur ondes moyennes et courtes, et vers l'Europe le dimanche à 20 heures sur ondes moyennes 526 kHz, et ondes courtes (49 m,41 m et 31 m) ainsi que le jeudi à 6 heures .

=====

**pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...**

...  **nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**

CONGRES (dans l'ordre des dates) :

Printempa semajno en Nigra Arbaro (interalie por familioj) 13-20 avril. Inf : Hedwig Fischer Gustav-Adolfstr. 2 D-4418 Nordwalde (RFA).

45e Congrès de SAT-Amikaro 14-17 avril (Pâques) à Bondy (Seine Saint-enis). Inf : André Legros 22,av Dumesnil 93140 BONDY.

Unuaj tutmondaj kunsidoj : "La iĝanta mondo" 25-28 avril à Tours. Les organisateurs ont édité une grande affiche en Espéranto et on l'intention d'utiliser au maximum l'Espéranto. Inf : Komitato de Organizado de la Kunsidoj de Tutmondismo B.P 0631 37006 TOURS Cédex.

35a KULTURA SEMAJNFINO en HOMBURG (Sarlando)

11/13ajn de majo 1990 = SEL, Querstr.11, D-6607 QUIERSCHIED

16-21 aprilo: INTENSIVA PRETIĜO AL TRAPASO DE ESPERANTO-EKZAMENOJ. Instruos Claude GACOND, sviso, direktoro de KCE, instruisto kaj redaktoro por la esperanto-fako de Svisa Radio Internacia; François DEGOU, franco, agregacia profesoro pri la franca, latina kaj greka lingvoj kaj Stefano MACGILL, novzelandano vivanta en Budapeŝto, redaktoro, tradukisto, verkisto, sekretario de ILEI. Multaj hezitas sin prezenti en sesio de esperanto-ekzamenoj pro manko de kritikaj konsiloj. Precizaj ekzercoj individuigitaj kaj grupaj ebligas al ĉiu malkovri la proprajn mankojn kaj venki ilin per serioj da taskoj: korekto kaj transformo de gramatike kaj stile nekontentigaj tekstoj, esperantigoj de tre diversaj dokumentoj, konsulto de fundamentaj libroj, parolaj raportoj pri legaĵoj, debatoj, ktp.



F. DESMARQUES

Laurent
Petitgirard :
rêver sur la
légende.

L'Auditorium accueille aujourd'hui « Le Légendaire » de Laurent Petitgirard qui mêle le violon, les voix et l'espéranto.

BOUDDHA, Peter Pan, E.T., l'ange Gabriel... Ce sont quelques uns des personnages qu'évoque Laurent Petitgirard, au sujet de sa partition *Le Légendaire*, qui est donnée ce soir en première lyonnaise.

Pour la forme, il s'agit tout simplement d'un concerto pour violon avec chœur et orchestre. Mais le compositeur français aime à faire éclater les structures : les six pupitres de voix sont tous divisés, ce qui conduit à une écriture chorale de douze voix, alors que la partie de violon soliste est traitée dans les parties les plus diverses de l'instrument, en particulier lors de deux grandes cadences ponctuant l'œuvre. Enfin, la langue utilisée est l'espéranto : une palette de vingt mots autour de l'idée fondamentale de légende.

Une grande première dans le monde de la musique.

C'est lors d'un séjour au château de Lascours, lieu de musique et de rencontre, tout près d'Avignon, que Laurent Petitgirard a conçu sa partition, créée

à Flaine en août 1986 et enregistrée par FR3. Ce soir, le compositeur dirigera lui-même sa musique, à la tête de l'Orchestre national de Lyon, la partie soliste étant tenue par le violoniste Augustin Dumay, dédicataire de l'œuvre. Quant à la soirée, elle sera complétée plus traditionnellement par l'illustre *Gaîté parisienne* de Manuel Rosenthal, bâtie sur des thèmes d'Offenbach et par un Stravinski qui a bien rarement l'honneur des salles de concerts : celui du *Roi des étoiles*. Mais Augustin Dumay aura aussi l'occasion d'interpréter l'une des plus rutilantes partitions de Maurice Ravel : *Tzigane*, pour violon et orchestre.

G.C.

ATENTON !!! LASTA NUMERO !!



Jes, se vi ne pagos vian abonon por La Informilo, ĉi-tiu numero 69 estas la lasta sendita al vi.

— Kiel scii, ĉu vi jam pagis vian abonon?? Tio estas tre facila: Sur la adres-etikedo de via Informilo, la unua linio konsistas el la adreso-kodo kaj poste la abono-jaro. Se tiu abono-jaro estas 90, tiam vi estas jam paginta vian abonon por 1990. Gratulojn! Post la abono-jaro troviĝas mencioj pri viaj pagoj por la koncerna jaro, A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.

— Se la abono-jaro estas 89, tiam aperas poste la mesaĝo Lasta Numero !!, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon por 1990. Bonvolu tion fari senprokraste, se ne, vi donos al nia kasisto la malagrablan taskon, sendi al vi en majo aŭ junio alvok-leteron, kiun vi verŝajne ne ŝatus ricevi, kaj kies afranko estas plia elspezo por la Federacio. Krome vi riskas ne regule ricevi La Informilon.

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj	45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	15 Rpk aŭ 57 FF
Federacia kotizo	23 FF
Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando	20 FF

— Nia poŝtĉekkonto:

FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO 1997 72W NANCY

— Aŭ al nia kasisto:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.

— Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (*departementoj 54 55 57 67 68 88*) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, bonvolu aparte pagi vian federacian kotizon je 23 FF por iĝi aŭ resti federacia membro.

— Aparte mi dankas al la abono-pagintoj, kiuj samtempe sendis al mi siajn afablajn bondezirojn por la nova jaro. Al ili mi reciproke deziras plej feliĉan nova jaron, kun prospera partopreno en la diversaj Esperanto-aranĝoj.

***** ANGULO DE LA PREZIDANTO *****

" Estimataj gefederacianoj!

Novjaros de pluraj semajnoj, kiam vi legos tiujn liniojn, sed mi atendis la unuan "LA INFORMILO"-n de 1990 por deziri al vi ĉion bonan. Ankaŭ al nia federacio mi volas deziri sukcesplenan jaron. Ĝis nun ni konfesu, ke niaj atingoj ne estas mirindaj, sed almenaŭ ion ni sukcesis konservi: amikan etoson dum niaj staĝoj, kiuj kuniĝas homojn el diversaj landoj kaj kun diversaj intereso. Se ni konsideras, ke la tuta laboro estas farata nur pro bonvolemo, niaj atingoj ja tamen estas konsiderindaj.

Ĉiuj certe komprenas, ke la plej baza neceso estas la organizo de aranĝoj, aŭ klube lokaj, aŭ regionaj, aŭ naciaj kaj internaciaj. Sed la loka informado pri okazontaj kaj okazintaj kunvenoj certe ne sufiĉos por disradiigi nian mesaĝon al la ekstera publiko. En nur 39 francaj departementoj okazis esperanto-kursoj en 1988/89 ("Franca Esperantisto" n° 405). Ĉar mi respondecas pri la starigo de tiu listo, mi povas konfesi al vi, ke mi preskaŭ havis la impreson, ke multaj samideanoj eĉ ne deziras, ke oni parolu pri iliaj kursoj! Kiel, tiam, informi la publikon?

Ĝis nun, aperigo de informoj dependis tro ofte de la bovolemo de loka ĉefredaktoro aŭ de la foja malhavo de aliaj informoj. Sed por regula de ni verkita informado ni bezonas monon. Jam UFE, nia nacia asocio, investas de pluraj jaroj por budo ĉe "EXPO-LANGUES" kaj aliaj foiroj, same por reklamo en fakaj gazetoj. Ne tuj venis la esperitaj sukcesoj, sed ni tamen notu, ke la lastaintensiva staĝo de UFE arigis 30 (jes... tridek!) komencantojn en PARIZO, kiuj pagis mor membri en UFE, kio alportis sumon tuj reinvesteblan en nova reklamkampanjo.

Jen kial ni pagigas la kursojn! Nur novaj membroj alportas al ni monon. Alfluas la petoj de samideanoj por senkosta disponigo de reklam-materialo, sed por realigi ĝin ni bezonas monon!...

Nun, ni disponas pri "36 15 ESPERANTO"... (vidu aliloke specifan informilon uzendan pri tio). Ankaŭ vi, uzu afiŝojn aŭ pagajn reklamojn kun tiu informo. La detalojn la homoj interesitaj legos sur sia ekrano.

Pro tio mi finas mian "angulan" alvokon per danko pro via membriĝo ĉe UFE. Ne forgesu, ke la kotizo entenas la aliĝon al nia federacio. Nur la abonon al "LA INFORMILO" vi devos krompagi. Sed ĉu ni ne povas fieri pri nia regiona bulteno? Mi fieras pri ĝi kaj dankas al la redaktoro, kiel mi dankas al ĉiuj, kiuj helpas nin, aŭ mone, aŭ labore."

Edmond LUDWIG

P.S. = Iuj iel jam iam ion similan legis... ili sciis, ke la subskribinto estas instruisto, kiu scias, ke en ripetado kuŝas la ŝlosilo de l' sukceso!

***** J-L ☆ G *****

La tuta Federacio ĝojas! Nia nelaciĝebla helpanto Jean-Luc THIBIAS ĵus edziĝis! Ni ĉiuj firme esperas baldaŭ konatiĝi kun lia ĉarma edzino Grazyna el Pollando... Korajn gratulojn al la nova paro kaj ĉion bonan dum la futuro! *****

➔ GRAVA ATENTIGO! PRO MATERIAJ KIALOJ, LA ELDONO DE ĈI-TIU N° DE LA INFORMILO CERTAGRADE MALFRUAS... TIAL NI PETAS NIAJN LEGANTOJN, KIUJ INTENCAS PARTOPRENI NIAN STAĜON EN MĒRKWILLĒR, TUJ, SENPROKRASTE, URĜE, SENDI SIAN ALIĜILON AL SIN° SCHEIDEL, NEPRE ANTAŬ LA 25A DE MARTO!

NANCY _____

Kursoj - La vespera kurso por komencantoj finiĝis la 31an de januaro. Tiam ni ekler-nis "M12". La 2a-grada kurso okazis ĝis nun 3-foje monate (eble tro ofte?), do lastatem-pe venis nur 1 aŭ 2 personoj. La 3a-grada okazas 1-foje monate, kaj ankaŭ en ĝi venas nur 1 aŭ 2 homoj. Reorganizado de tiuj 2 kursoj estas okazanta.

Se la esperantistoj ŝajne ne tre kurage venas por lerni progresigajn kursojn, ili ve-nas pli volonte por babili, manĝi kaj trinki! Tiel 9 personoj ĉeestis la 29an de novem-bro en la kadro de la 2a-grado, kaj 12 personoj la 13an de decembro por la "Zamenhof-vespero". Ni kantis kaj Dr^o Pelinca da Costa prezentis al ni belegajn diapojn pri Brazilo, ĉefe pri Rio kaj la mondfama Karnavalo...

Turisma Oficejo - La T.0^o konsentis denove aperigi en 1990 la kutiman tutpaĝan anoncon en la Jarlibro de UEA. Tiel la tutmonda esperantistaro povos daŭre informiĝi, ke meze de Loreno oni trovas rimarkindan arkitekturan tutaĵon de la 18a jarcento kaj Muzeon kaj domojn de la epoko ĉirkaŭ 1900, ktp.

Ĝis nun la Oficejo ne konsentis eldoni novan ilustritan koloran prospekton, kiun ni sugestas de pluraj jaroj. Vi sciu tamen, ke la kutima prospekto en E^o estas daŭre dispo-nebla. Por ricevi ĝin senpage, skribu al: TURISMA OFICEJO, 14 Place Stanislas, F 54000 NANCY. (Vi petu plurajn ekzemplerojn... por ekspozicio, por viaj gekorespondantoj, por via bopatrino, ktp... sed Francoj prefere skribu franclingve! La leterojn en E^o la T.0^o direktas al mi kun peto pri traduko. Tiel sufiĉe ofte alvenas leteroj el la tuta mondo, ĉefe el Pollando, kaj finfine eĉ la leterojn en la pola lingvo oni lastatempe ankaŭ sen-dis al mi por traduko!...).

Perkoresponda Kurso - En la nova lernjaro ni jam dissendis de post septembro 32 kom-unikojn al la loka gazetaro. Ĝis nun ni povis kontroli la aperon de nur 10 el ili. Ali-ĝis al la kurso 18 personoj ĝis nun. En la lasta "Informilo" ni jam anoncis, ke 1 lernan-to finlernis "M11" post 1-monata lernado (Sr^o MACHER en Flaxlanden-68720). Nun 2a ler-nantino atingis la finon de "M11" (Fin^o Rachel DATIN en Dolcourt-54170), gvidita de Sr^o Greiner. Gratulojn!

La gazetaro kaj ni - La komunikoj pri nia Perkoresponda Kurso estas dissendataj al 10 regionaj gazetoj sur la teritorio de nia Federacio, sed ankaŭ ekster ĝi, kiam ni ha-vas eblecon aperigi (en departementoj 51-52-70). Jen do la listo de la gazetojkaj la nom-bro de komunikoj, kies aperon ni povis kontroli dum la lasta lernjaro (1988/89):

- 1/ "Les Affiches de Hte-Saône" (70-LURE) aperigis 7 komunikojn (okaze 2-foje la sama)
- 2/ "Le Républicain Lorrain" (57-METZ) aperigis 6, dank' al la agado de Sin^o NAU.
- 3/ "L'Est Républicain" (54-NANCY) aperigis 5. Bedaŭrinde nur 1 aperis en ĉiuj eldonoj (cirkaŭ 10 en 7 departementoj) kaj 4 (3-foje la sama) nur en Nancy, do tiam la efiko ne estas granda.
- 4/ "La Haute-Marne Libérée" (52-CHAUMONT) aperigis 3.
- 5/ "L'Echo des Vosges" (88-GERARDMER) dank' al gesinjoroj Lambert, "L'Alsace" (68-MULHOUSE), "La Liberté de l'Est" (88-EPINAL) aperigis po 2.
- 6/ "Les dernières Nouvelles d'Alsace" kaj "Les Affiches Moniteur d'Alsace et de Lor-raine" (ambaŭ en 67-STRASBOURG) aperigis po 1. "DNA" (kaj "l'Alsace" en Mulhouse) aperi-gas nur tre mallongajn resumojn tute sen efikigi. "AMAL" afable sendas al ni ekzempleron de la gazeto ĉiufoje, kiam aperas komuniko!
- 7/ "L'Union" (51-REIMS) nenion enpresis lastjare (sed jam enpresis 2-foje en la nuna lernjaro.

Ĉu la rezultoj en nia varbado spegulas tiujn aperojn en la gazetaro?

Jean-Paul COLNOT

ALDONO pri nia P.K^o - Jen interesaj ciferoj pri la lernjaro 88/89. la cifero: la nom-bro de informpetintoj, la 2a: nombro de aligintoj.

51: 1 - 0 = 52: 7 - 4 = 54: 39 - 6 (plus 10 en parola kurso) = 55: 3 - 0 =
57: 23 - 15 = 67: 7 - 4 = 68: 11 - 7 = 70: 2 - 1 = 88: 10 - 5 = diversaj
aliaj departementoj: 11 - 4.

La varbado en 67 kaj 68 ne venas generale el la gazet-komunikoj, sed el la agado de Sin^o SCHEIDEL kaj la grupo de MULHOUSE.

NOTRE MATERIEL D'EXPOSITION: PRATIQUE, EFFICACE...

UTILISEZ-LE!

A nouveau remis en service après réactualisation (statistiques en particulier) ce matériel est constitué de 9 panneaux rigides double-face, de 0,80 x 0,60 soit une surface de documents informatifs de 8,64 m²... Les panneaux sont insérés dans un cadre d'aluminium. Les 9 éléments sont à poser verticalement et peuvent se solidariser au gré de l'utilisateur (méthodes de présentation jointes). Le tout est conditionné dans une solide caisse de bois munie de 4 poignées pour en faciliter la manipulation. Poids total: 35kg.

LISTE DES THEMES EVOQUES: *le "S.I.A." - la tour de Babel - la communication à l'ère des satellites - le mythe de l'anglais - nécessité d'une L.I. - Zamenhof - L'E°, langue facile - l'E° et sa presse - l'E° et sa littérature - l'E° sur les ondes - l'E° et la musique - l'E° et la philatélie - les services de l'E° - l'E° efficace à 100 % partout comment apprendre l'E° - pour tous... le monde à portée de main - avec l'E°... fini de "babéler"!*

Ce matériel, propriété de la Fédération, est mis gratuitement à disposition sur simple demande. Seuls les frais de transport sont à la charge du demandeur.

Responsable à contacter: Claude NOURMONT, 2 Om Kläppchen, L-5682 DALHEIM
tél.: 688 64

FEDERACIA VARBAD-KONKURSO _____

Ĉiujare, de kelkaj jaroj, funkcias konkurso de la plej bona varbanto al nia perkoresponda kurso (Kompreneble la respondeculo de la kurso ne konkuras mem). Dum pluraj jaroj gajnis la premion Sin° Marthe NAU (Montigny-lès-Metz). Ĉi-jare vigle varbis la grupo de Mulhouse (8 varbitoj) kaj ĝi do gajnas la premion. Sin° Nau alvenas dualoke kun 4 rektaj varbadoj (plus kelkaj nerektaj el departemento 57, dank' al komunijoj en "Républicain Lorrain"). Ankaŭ varbis Sin° SCHEIDEL (4 varbitoj), Sin° BERNEY (2), Sr° ETIENNE, Sr° COLIN (po 1).

Dankon al ĉiuj!

J.-P. COLNOT

NIA VIVO EN...

COLMAR _____

La agado pluas en Colmar. La 20an de februaro, en la MJC Schlumberger, dudeko da esperantistoj sekvis kun granda intereso la diapozitivo-prezenton de Karl-Heinz RENCHLER, UEA-delegito el la apuda germana urbeto Bad-Krozingen, kiu afable kaj lerte prelegis pri sia vojaĝo al Cinio kaj tra la Pacifiko.

E. LUDWIG

BAR-le-DUC _____

Diligente laboras la 10 gelemantoj de la 1a-grada kurso. "Metodo 11" baldaŭ elĉerpiĝos kaj tutverŝajne pluraj el ili daŭrigos sian studadon per la "M.12"-libreto. La klubkunvenoj okazas regule ĉiun 2an merkredon de la monato; ĝin vizitas gastoj el departemento 52.

Tridek personoj partoprenis la Zamenhof-vesperon okazintan la 20an de januaro en la "Soci-Kultura Centro" Marbot. Ek de la komenco disvolviĝis tre amika etoso kaj oni enpakigis plej diversajn varojn (ĉ. 40 kg!) sendotajn al rumana esperantista familio, kiu travivis la strat-batalojn en la urbo SIBIU. Pri tiu ero de la vespero kuŝas specifa raporto en nia bulteno.

Memevidente eksonis ankaŭ kantoj en E° kaj la tuta ĉeestantaro senbride ĝojis kaj ridis spektante la nerakontebajn skeĉojn ludatajn de la -ĉu kutimaj?- "aktoroj" F.X. /L. Gilbert, M. Dillenschneider/P. Denis... Bongustaĵojn arte pretigis la paro René kaj Pierre Canus. La tradiciaj "Reĝo-Tortoj" dis-partiĝis kaj surtroniĝis la "nokto-reĝino"!

La grupo jam preparas sian jaran "kultur-viziton"; oni planas noktan ĉeeston de la finpretigo de la gazeto "L'Est Républicain" en Houdemont.

Ni menciuj ankaŭ gravan eventon: oficiala kurso de E° en la Komerc-Ĉambro, gvidita de ties Direktoro, François-Xavier GILBERT. Pri ĝi vi legu apartan raporton.

P. DENIS



PSSSTTT!!!... NOVAĴOJ EL NIA LIBRO-SERVO!...

La libro pri
 ***** Pipi Ŝtrumpolonga *****

estas verŝajne la plej legata libro de la mondfama sveda aŭtorino Astrid Lindgren. La libro estas ankaŭ filmita kaj montrita en la televido en multaj landoj. La libro pri Pipi jam aperis en 53 lingvoj, kaj nun ĝi aperas en la internacia lingvo Esperanto. Tiu ĉi nova eldono devas kompreneble havi lokon sur la librobreto de ĉiu esperantisto kaj en ĉiu biblioteko en Svedio kaj aliaj landoj.

La libro pri Pipi Ŝtrumpolonga estas konvena donaco je kristnasko, naskiĝdatoj kaj aliaj festotagoj.

***** de
 Astrid Lindgren



Progreso Eldonejo

NEPRE HAVIGU ĜIN AL VI.... 96,00 F



M I S T E R A A N T A Ŭ S C I I G O

La LIBRO-SERVO de ORIENT-FRANCA ESPERANTO-FEDERACIO naskis sian unuan "bebon".... VENU! VIDU!...

=====

ZAMENHOF-FESTO EN MULHOUSE

La E°-grupo de Mulhouse havis en 1989 la plezuron kaj la taskon organizi siavice la Zamenhof-feston, kiu en la antaŭaj jaroj okazis aŭ en Bazelo, aŭ en Frajburgo, organizita de la koncernaj grupoj. La 16an de decembro 1989 ni do havis la plezuron bonvenigi gesamideanojn el Svislando, Germanio, el la regiono, sed ankaŭ el Dijon kaj el Besançon. Entute estis preskaŭ 40 partoprenantoj, kiuj kunvenis en la ne tro granda salono de la hotelo Balladins, jam konata de pluraj samideanoj pro antaŭaj Esperanto-aranĝoj.

Per kafo kaj kukoj membakitaj de niaj klubaninoj ni akceptis la unuajn kaj ankaŭ la postajn alvenantojn. Tuj, ĵurnalisto de "D.N.A." venis por fari foton, kiu aperis en la dimanĉa eldono. Nia programo komenciĝis per loto-ludo kun multaj kaj diversvaloraj premioj. La kartoj estis komputore ellaboritaj kun 3 linioj de 5 numeroj, do entute 15 numeroj po karto. Je ĉiu plenigita linio oni ricevis premion. Je plenigita karto oni ricevis ĉefan premion kaj tiam finiĝis la ludo. Tri tiaj ludoj okazis, kiuj ŝajne kontentiĝis multajn gajnantojn.

La sekvanta programero estis skeĉo tradukita de la alzaca, kun la titolo: "En la banko". Rolis R. Kueny kaj A. Grossmann. Intertempe alvenis la aktorinoj de la pupteatraĵo, kaj instalas la scenejon. S-in° Nevenka IMBERT el Jugoslavio, membro de la fama pupteatra grupo "Kvak" el Zagrebo, prezentis al ni per siaj ne-kutimaj marionetoj el kalabaso scenetojn, poeziaĵojn, pantomimojn, kiuj distris kaj ĝojigis ĉiujn partoprenantojn de tiu Zamenhof-festo.

Tiel finiĝis la distra parto de nia vespero, kaj atendis nin iom malfrue, ĉar jam estis pli ol la 20a30, la vespermanĝo en la hotela restoracio. Ni povis abunde kaj laŭplaĉe plenigi niajn telerojn per la plej ŝatataj antaŭmanĝaĵoj kaj desertoj, kaj amike babili kun konataj amikoj aŭ konatiĝi kun novaj. Entute, ŝajne ĉiuj estis kontentaj pri tiu agrabla vespero.

La grupo de Mulhouse

29a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto



SAMEDI 31 mars
et DIMANCHE 1er avril

Hôtel "A L'ETOILE"

F-57250 MERKWILLER-PECHELBRONN



Notre 29^{ème} STAGE d'ESPERANTO PARLE ainsi que notre ASSEMBLEE GENERALE ANNUELLE auront lieu ce printemps à MERKWILLER-PECHELBRONN, une jolie bourgade située au nord de l'Alsace, entre Haguenau et Wissembourg.

Odette SCHEIDEL, l'organisatrice, invite tous les "samideanoj" des pays proches ou lointains -ainsi que de France!- à visiter ce site plein d'intérêt.

Dans le cadre du stage, M. MICHEL, ingénieur de PECHELBRONN, vous guidera au "musée du pétrole" et vous informera sur les nouvelles méthodes d'exploitation de la couche de naphte. Vous ferez également connaissance avec la "station thermale" et sa source chaude.

Le "Mandoline-Club" de MERTZWILLER se produira au cours de la soirée de détente, en souvenir du professeur KIEHL un espérantiste qui dirigea naguère cette formation.

Un cycle de conférences de haut niveau s'ajoutera aux cours d'espéranto de 3 degrés.

PROGRAMME

SAMEDI, 31 mars 1990

... jusqu'à 14h45: accueil des participants

15h/18h30: cours de degrés différents (pauses déterminées en commun)

= COURS A (d'initiation) pour débutants de langue française ou allemande.

Animateur: M. LUDWIG ("Metodo 10")

= COURS B1 pour les élèves du "cours par correspondance" de la Fédération.

Animateur: M. KUENY ("Metodo 11")

= COURS B2 pour les "pratiquants"

Animateur: M. GROSSMANN "Metodo 15")

= "SEMINAIRE LINGUISTIQUE" avec la participation de M. FARJON DE LAGATINERIE: "L'ESPERANTO, langue isolante en habits de flexion".

L'ESPERANTO, mythes et lecteurs.

18h30: Service de Librairie... à visiter et à épuiser!

19h15: Dîner en commun

20h30: "SOIREE-DETENTE" au contenu à découvrir dans une ambiance des plus amicales!

DIMANCHE, 1er avril

9h/12h: cours selon le même schéma

12h15: déjeuner en commun

14h15: pour les membres de la Fédération

ASSEMBLEE GENERALE

pour les autres: visite du musée

FRAIS DE PARTICIPATION

= Cotisation-adhésion: (à envoyer avec votre fichet d'inscription):

= Abonnés à "LA INFORMILO": 100,00FF

- Non-abonnés: 140,00

- Jeunes gens jusqu'à 18 ans: 40,00

de 18 à 25 ans: 80,00

Les deux repas du samedi soir et du dimanche à midi seront pris en commun sur place à l' Hôtel ETOILE.

DINER: 38,00FF, DEJEUNER: 38,00

PETIT DEJEUNER: 15,00 NUITEE à l'Hôtel, 1, Rue de Woerth

1 nuit: 70,00FF 2 nuits: 140,00



Veillez envoyer le fichet d'inscription ci-dessous avant la date limite du 25 mars -merci!- à:

Mme Odette SCHEIDEL

35, Grande Rue

F-67660 BETSCHDORF - tél.: 88 54 45 02

accompagné de votre cotisation d'adhésion (chèque bancaire ou postal au nom d'Odette SCHEIDEL)

Nos amis étrangers paieront sur place de préférence.

les "Méthodes 10 et 15" seront à acheter sur place. Les stagiaires des cours B1 et B2 voudront bien apporter leur propre "Metodo 11".



BULLETIN D'ADHESION

URGENT

(veuillez cocher les cases concernées)

29^{ème} STAGE D'ESPERANTO PARLE
F-67250 MERKWILLER-PECHELBRONN
31 mars/1er avril

* (veuillez rayer ce qui ne convient pas)

M. Mme NOM :
Prénom:

ADRESSE

Je réserve ___ lit(s) dans une chambre à 1* 2* lit(s)
pour la nuit de vendredi à samedi
pour la nuit de samedi à dimanche

Je réserve ___ dîner(s) (samedi soir)
___ déjeuner(s) (dimanche midi)

Je joins ma cotisation d'adhésion (100 - 140 - 80 - 40)*
(additionnez si plusieurs personnes)

Je prendrai part au cours A B1 B2
au séminaire linguistique

Je réserve un exemplaire de la METODO 10
METODO 11 METODO 15

Je désire visiter le musée

Date et signature:

29a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto



SABATON, la 31an
kaj DIMANĈON, la 1an de aprilo 1990
Hotelo "ETOILE" (anekso)
F-57250 MERKWILLER-PECHELBRONN
Tel.: 88 80 71 80



Sub la ŝildo de la ORIENT-FRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO okazos ĉi-printempe nia 29a STAĜO kaj ĜENERALA ASEMBLEO en MERKWILLER-PECHELBRONN, alloga loko situanta norde de Alzaco, inter Haguenau kaj Wissembourg.

Odette SCHEIDEL varme invitas ĉiujn samideanojn el apudaj aŭ foraj landoj -kaj el Francio!- viziti tiun interesindan urbeton.

Kadre de la staĝo, Sinjoro MICHEL, inĝeniero de PECHELBRONN, vizitigos al vi la "petrolo-muzeon", informos pri la estonta ekspluatado de la tiea nafto pere de novaj metodoj. La "termo-stacio" estas vizitota, ĉefe la varma fonto.

En la distra vespero partoprenos mandolina klubo el MERTZWILLER, memore al profesoro KIEHL, esperantisto, kiu anim-gvidis tiun orkestron.

Al la 3 diversgradaj kursoj aldoniĝos elstara seminario

PROGRAMO

SABATON, 31an de marto 1990

... ĝis la 14a45: akcepto de la partoprenantoj

15a/18a30: diversnivelaĵoj kursoj
(paŭzoj laŭ komuna interkonsento)

= KURSO A por komencantoj, ĉu german-
aŭ franclingvaj. Gvidanto: Sr° LUDWIG
(Metodo 10)

= KURSO B1 por lernantoj de la perkoresponda
kurso. Gvidanto: Sr° KUENY (Metodo 11)

= KURSO B2 por praktikantoj.

Gvidanto: Sr° GROSSMANN (Metodo 15)

= SEMINARIO kun Sr° FARJON DE LAGATINERIE,
lingvisto. "ESPERANTO: izola lingvo en
fleksiaj vestoj. ESPERANTO: mitoj
kaj legantoj"

18h30: Libro-Servo... Nepre vizitu kaj aĉetu!

19h15: Komuna vespermanĝo.

20h30: "VARIETEA VESPERO", kies enhavon
vi malkovros en plej amika etoso.

DIMANĈON, 1an de aprilo

9a/12a: samritmaj kursoj

12a15: Komuna tagmanĝo.

14a: Por federacianoj: "GENERALA ASEMBLEO"

Por la aliaj: Vizito de la petrol-muzeo,
termo-stacio, ktp.

PARTOPRENO-KOSTOJ

= Aliĝkotizo (sendenda samtempe kun via aliĝ-
slipo):

- Abonantoj al "LA INFORMILO": 100,00FF

- Ne-abonantoj: 140,00

- Gejunuloj ĝis 18 jaroj: 40,00

18/25 jaraĝaj: 80,00

Ni komune vespermanĝos (sabate) kaj tagman-
ĝos (dimanĉe) surloke, en la Hotelo ETOILE
VESPERMANĜO: 38,00FF, TAGMANĜO: 38,00

MATENMANĜO: 15,00 TRANOKTADO en la Hotelo,
1, Rue de Woerth

- 1 nokto: 70,00FF 2 noktoj: 140,00

La ĈI-SUBAN ALIĜILON vi sendu nepre antaŭ
la 25a de marto 1990 -dankon!- al:

S-in° Odette SCHEIDEL

35, Grande Rue

F-67660 BETSCHDORF - tel.: 88 54 45 02

samtempe kun la petita aliĝ-kotizo (banko- aŭ poŝt-
ĉeko je la nomo de Odette SCHEIDEL)

Eksterlandanoj prefere pagu surloke

"Metodoj 10 kaj 15" estos aĉeteblaj surloke.
Staĝanoj por kursoj B1 kaj B2 bonvolu kunporti
sian propran lernolibron "Metodo 11".

29a STAĜO de PAROLATA ESPERANTO
67250 MERKWILLER-PECHELBRONN(F)
31an/3=1an/4 1990

aliĝilo

(bonvolu trastreki
la koncernatajn kvadratojn)

Sr° Sin° Familia NOMO
Persona NOMO

* (bonvolu trastreki tion, kio ne validas)

ADRESO

Mi rezervas ___ lito(j)n en unu-* du-* lita ĉambro
por la nokto de vendredo al sabato*
por la nokto de sabato al dimanĉo*

Mi rezervas ___ vespermanĝo(j)n (sabate)
___ tagmanĝo(j)n (dimanĉe)


Mi antaŭpagas mian aliĝ-kotizon (100 - 140 - 80 - 40)*
(adiciu se pluraj personoj)

Mi partoprenos la kurson A B1 B2
la seminarion



Mi rezervas ekzempleron de METODO 10 METODO 11
METODO 15

Mi deziras viziti la muzeon

Dato kaj subskribo:



LA SOLUTION



FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

LA MULHOUSE--ANOJ VARME AKTIVAS!... _____

FORUMO DE LA ASOCIOJ

Kiel lastjare, denove okazis tiu evento dum du tagoj, finsemajne, la 10/11ajn de februaro. Jen ebleco por ĉiuj asocioj de la departemento sinprezenti al la publiko. Do, kompreneble, ĉar la ĉefa problemo por ni esperantistoj estas konigi la lingvon, ni partoprenis per prezentado de nia famkonata panel-ekspozicio, de libroj, gazetoj, instrumaterialo, reklamfolioj, ktp. kaj ni celis ĉefe interesigi la homojn per diskutado deziro iom malfacila, ĉar nia budo kuŝis iom tro malproksime de scenejo, sur kiu ofte sin prezentis ekzotikaj grupoj, ĉarmaj sed...bruaj!

Ni tamen kolektis kvardekon da adresoj pere de enket-folio en kiu ni demandis, ĉu interesigantoj preferas perkorespondan kurson -aŭ parolatan- cele eventualan organizon de nova kurso en Mulhouse, aŭ aliflanke, ĉu efikus sabata unutaga kurseto. Ni memorigu, ke nuntempe okazas regula kurso en kultur-domo de Illzach "Espace 110", ĉiuj aŭde vespere (18/19a30) kaj paralele dua-grada kurso marde vespere en Mulhouse.

PRESENTADO DE NIA MIGRA EKSPOZICIO

Tio okazis en la ĉef-enir-halo de la Biblioteko de Mulhouse, 19, Grand'Rue, post la Forumo de la Asocioj, de la 13a ĝis la 23a de februaro. Ni kunlasis kelkcentojn da informfolioj "Unua Rendevuo" kaj la jam menciitajn enket-foliojn kunekun kompreneble urno por kolekti la adresojn, kiuj kompletigos la adresaron jam elfaritan dum la Forumo.

BABILADO PRI E° ĈE LOKA PRIVADA RADIO

La 17an de februaro, "Radio-Florival", kies sidejo estas en 68 Guebwiller, invitis federacianojn por paroli pri la internacia lingvo dum sabat-matena elsendo (8a/10a horo) kies temo titoliĝas "Diskutado ĉe kutimintoj-tablo". Sr° Alex FRICKER, radio-animanto, intervjuis Edmond LUDWIG kaj Robert KUENY... en alzaca dialekto... Jes!... la tri Alzacanoj fieris uzi sian patrin-lingvon por preparoli neŭtralan lingvon! Post la deka alvenis multaj alvokoj, kiuj kuraĝigis rekomenci kaj daŭrigi tian varb-agadon.

DIVERSMANIERAJ EBLECOJ POR KONATIGI ESPERANTON

Lokaj gazetoj, ekzemple la sud-alzaca ĵurnalo "L'ALSACE", entenas ĉiumarde paĝon... "Dialogo". Do, ni ekdialogu! Ĉefe kiam iu komentis la gravecon de komunikado tra la mondo en la estonteco kaj finfine proponis, ke oni lernigu la anglan jam en la bublernejo!

Bona okazo por klarigi, tra la gazeto, pere de nova artikolo, ke ekzistas ankaŭ facila, simpla, neŭtrala, genia, flueca, eĉ konstruita lingvo! Ni ne volas kontraŭi la aliulojn sed nur spertigi egal-nivelan konkurecon, malfermi debaton. Tiun klarigintan skribaĵon sekvis nova teksto, de eminenta esperantisto, kiuj kompletigis kaj apogis per aliaj komentoj, la lastan esperantistan tekston. Ju pli da artikoloj aperas en gazetoj, des pli bone por la movado! Ni diru, ni ripetu, ke ni, uzantoj de la internacia lingvo, devas esti la "montro-fenestro" de la konkreta komunikado!

Robert KUENY

EN LA VOGEZOJ... _____

Gvidata de Michèle LAMBERT kaj Georges VERDIER, nova unua-grada kurso okazas ek de la fino de januaro: 10 plenkreskuloj aligis.

Gi funkcias per "METODO 11", ciumerkrede, de la 17a ĝis la 18a horo kaj duono, kadre de "GERARDMER-ACCUEIL"

Dua-grada kurso daŭre okazas en la Kultur-Domo (8 partoprenantoj).

Robert COLIN

"LA SOLUTION"...?... Ĉu vi divenis la celon de la antaŭa paĝo? Nu, vi fotokopiu (konsilinde sur hela kolorpapero), pligrandigu, afiŝu ĉie, kie renkontiĝas homoj... Pli kaj pli kutimas la uzado de "Minitel"... Ni ne flanke lasu tiun rimedon por informi...

I.F.V. = Komerca Lernejo
de la KOMERCA KAJ INDUSTRIA ĈAMBRO DE MEUSE en BAR-le-DUC

Duajare, la internacia lingvo Esperanto estas inkluzivita en la diversaj devigaj lernobjektoj. Dek-kvar gejunuloj studis ĝin kun granda intereso. La tuta ciklo enhavas kvardek horojn. Post la sperto de la pasinta jaro, ni decidis adapti la progresadon kaj doni al ni konkretajn celojn anstataŭ rapida libra lernado.

Tiel, la unua fazo ambicias doni sufiĉe da bazaj elementoj por kapabligila lernantojn skribi al eksterlanda korespondanto, kiu apartenas al la komerca reto de la tutmonda asocio I.K.E.F., kiun estras la aĉetsekciestro de la germana firmao BOSCH. Post naŭ horoj de studado, la gejunuloj elektis korespondanton kaj preparis kolektive privatan leteron. Finfine nur kelkaj konsentis fini sole la privatan parton de la letero kaj sendi ĝin .

Interkonsente, la dua fazo estis pli dediĉita al la parolata trejnado. Praktikajn ekzercojn oni faris tuj post la lego de teksto de la lernolibro de Triolle kaj Ludwig. Kompreneble estos certe pli efike uzi tekstojn pli adaptiĝitajn al la nunaj profesiaj zorgoj de tiuj ĉi gejunuloj, kiuj serĉas laboron kaj esperas trovi ĝin dank'al la studado en tiu institucio. Fine de tiu fazo, la gelernantoj trapasis la oficialan ekzamenon " atesto pri lernado "; 8 el la 14 kandidatoj sukcesis post kvardek horoj de studado. La notoj servos por la rezulto de la kompleta studado en la Institucio.

La tria fazo konsistis en prelego farita de komercisto, kiu uzis esperanton okaze de sia profesiaj agadoj . Por fari tion, konsentis veni el Bühl en Germanio sinjoro Braun prezidanto de IKEF, ĉisupre nomita. Dum unu horo, li klarigis pere de transvidleblaĵoj sian profesion respondecon, sian vojaĝon al sudorienta Azio pere de esperantaj korespondantoj ; kaj larĝa diskuto instaligis inter li kaj la gejunuloj pri komerca kampo kaj ankaŭ politikaj aferoj aparte la unuiĝo de la du Germanioj kaj la problemo de la landlimo Oder-Neiss. Sinjoro Gilbert tradukis la demandojn kaj kelkajn tro komplikajn respondojn. Sed la gelernantoj ŝajnis tre kontentaj ... tiom ke ni devis haltigi la kunvenon !

Estas en Francio, la unua kaj sola provo de enŝovo de la internacia lingvo Esperanto en komerca lernejo. Tiu ekzemplo devos esti reproduktata alie por krei reton kaj ĝemeliĝon kun eksterlandaj komercaj lernejoj. Ĉiu el ni estas koncernata kaj ĉio dependas de nia propra volo. Mi esperas ricevi de vi reagojn kaj proponojn.

Marton 1990 - F.X. GILBERT

PARTOPRENU NIAN STAĜON EN MERKWILLER!
SENDU TUJ VIAN ALIĜILON... TUJ NE MORGAŬ!



Tiu semajfino okazis en la tre komforta Domo "Kardinalo Wendel", de la 8a ĝis la 10a de decembro pasinta. Ĉeestis ĝin ĉirkaŭ 100 personoj el 6 landoj (Belgio, Nederlando, Luksemburgio, Ĉinio, Francio kaj kompreneble Germanio).

La pli multnombraj ĉeestantoj aŭskultis la tre interesan prelegon de Dr^o Ulrich LINS pri la naskiĝo de lia verko "La danĝera lingvo". Okazis krome kurso por komencantoj, gvidita de Karl BURGER kaj por la progresantoj 2 aliaj kursoj gviditaj respektive de Kresimir BARKOVIC kaj de Hermann BEHRMANN; sabate vespere niaj sarlandaj geamikoj vere klopodegis organizi interesan kaj buntan amuzan vesperon kun -inter multnombraj programeroj- vizito de Sankta Nikola(in)o, multfacetaj muzikajoj, dancoj, poemoj, segado de nederlandaj ŝtonoj(!)... kaj kompreneble kantoj. La tuto okazis en la plej simpatia etoso. Sincerajn gratulojn al ĉiuj ge-organizantoj kaj speciale al ilia prezidanto Josef DÖRR.

La proksima K.S^o okazos samloke la 11/13ajn de majo 1990, kun proksimume simila programo. La prelegonto estas Eddy BORSBOOM (NL) pri "La vivo kaj verkaro de Dr^o Zamenhoj"

J.-P. COLNOT

Ghislaine, el Haute-Marne, raportas ĉi-sube pri la sama evento:

"Pri la aranĝo mi rimarkas, ke ĉiam estas interese esti en Homburgo dum tiu momento, kiam flugas la aera parfumo de varma vino, tiel nomata "Gllhwein", ĉar ĉe ni ne ekzistas tiu preparo por la Kristnaskaj Festoj.

Mi ĉeestis la seminarion prelegitan de Dr^o Lins pri la libro, kiun li-mem verkis. Sr^o Lins prezentis sian libron, sian serĉadon pri la persekutoj spertitaj de Esperanto kaj de Esperantistoj en diversaj landoj. Mi ekparolis pri tiu problemo okazinta en Rumano antaŭ la famaj eventoj kaj la morto de la rumania prezidanto.

Por la unua fojo mi partoprenis la plej altnivelan prelegon. Mi pluminas pri la fluo de la interkonversacioj, ilia rapideco, kvazaŭ la parolantoj estus denaskaj esperantistoj! Mankas al mi tiu facileco; mi do forlasis la rendevuon, promesante al mi-mem pli studi la lingvon por kapabli flue paroli."

Ghislaine COLIN - Bourbonne-les-Bains (52)

El la sama departemento alvenis ankaŭ tiu raporto...

"...Rimarkindaj tri aferoj: unue la granda nombro de partoprenantoj, pli ol cent! Due, la diverseco de ties devenoj... eĉ el foraj landoj: Finnlando, Brazilo, Hongkongo. Trie, la ĉeesto de dek infanoj, esperiga por la esperantista movado.

Sabaton matene antaŭstaĝo entenis turisman rondiradon: bedaŭrinde malmultaj homoj povas liberigi tiel frue por tiam partopreni. Sed posttagmeze ĉiuj ĉeestis por la komenco de la instrua parto. Mi elektis la kurson B1 por progresantoj; tie kuniĝis dek lernantoj el kvin landoj, do ne krokodilante kaj eĉ ne tradukante, nur en esperanto, ni devis demandi, respondi kaj klarigi kun helpo de Sr^o Barkoviĉ, ĉiam afable ridetanta!

Sabaton vespere distra festo kunigis infanojn kaj plenkreskulojn sidantajn laŭ aranĝo de duoncirklo. Ĉe la komenco junulgrupo ĥore kantas, per flutoj kaj akordiono muzikas, kaj folklorajn dancojn ludas.

Ĉe la dua parto disvolviĝis la festo de Sankta Nikolao laŭ la germana tradicio: ĉiujare, la 6an de decembro, Avo Nikolao kaj lia akompananto Pedro Ruprecht, vizitas ĉiun domon por rekompenci la afablajn infanojn kaj puni la malsaĝajn. Do, ambaŭ folkloraj moŝtoj alvenis en nia vesperkunveno kaj aperis laŭ sia kutima aspekto: Nikolao, barbulo, episkope vestita, Pedro, nigrulo... aŭ nigre ŝmirinta sian vizaĝon! Ambaŭ roluloj ne tute maskis sian realan staton, aŭdigante siajn virinajn voĉojn kaj ŝerce ellasante kelkajn nederlandajn vortojn... Ĉu oni povas fidi la tradiciajn aperojn? Nikolao disdonis bombonojn al ĉiuj, Pedro donacis vergojn al... neniuj! Tute prave, ĉu ne?

Ĉe la fino de la vespero oni babilis aŭ dancis. La ludantaj infanoj postkuras unu la alian tra la ŝtuparoj kaj la koridoroj de la domo, laŭ petola karuselo.

Konklude ni dankas la Sarlandan Esperanto-Ligon, kiu perfekte organizis tiun instruan kaj distran staĝon. Jam ni estas invitetaj al la venonta...

Ĝis revido, tie, ni esperas!

Jean-Marie BARNOIN - Bettancourt (52)

NIAJ DONANCINTOJ EN 1989

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1989:

17

Donacoj por la Federacio:

S-ro BLANCHET 36 FF - S-ino WOHLSCHEGEL 100 FF - S-ro WICK 100 FF -
Restoracio Gambrinus 2 x 24 FF
Sume 136 FF

Donacoj por La Informilo:

S-ino JEANMAIRE 36 FF - S-ro MARTIN 18 FF - S-ino ORY 158 FF -
S-ino TRIOLLE 22 FF - S-ro VIVIER 45 FF - Diversa 6 F
Sume 285 FF

FINANCA RAPORTO ORIENTA FEDERACIO 1989

dato 07.02.1990

ENSPEZOJ FEDERACIO		ELSPEZOJ FEDERACIO	
120 Federaciaj membroj	2632.00	12 Sekretariaĵoj	1014.20
69 UFE-membroj kun pago	1229.00	5 Propagando	2148.10
3 Donacoj al Federacio	136.00	4 Perado de kotizoj	1047.00
1 Profito staĝoj	884.00	2 Aĉeto de materialo	78.00
6 Perado kotizoj abono	1047.00	2 Federacia premio	329.00
2 Rentumo resp.k sikav	1339.17	1 Riparado ekspozicio	187.00
4 Vendo de materialo	106.00		-----
1 Repago libro-servo	150.00		4803.30

	7523.17		
ENSPEZOJ INFORMILO		ELSPEZOJ INFORMILO	
248 Abonoj al Informilo	10663.87	2 Eldono Inf.65 370 ek	1952.00
6 Donacoj al Informilo	285.00	1 Eldono Inf.66 320 ek	1057.20
1 Aldon-pagoj	70.00	3 Eldono Inf.67 340 ek	1102.55
	-----	4 Eldono Inf.68 450 ek	2733.55
	11018.87	3 Enlanda sendado Inf.	319.33
		4 Eksterland.sendkosto	531.26
		1 Afranko + telefono	37.00
		6 Materialo por Inf.	483.97

			8216.86
ENSPEZOJ FEDERACIO	7523.17	ENSPEZOJ INFORMILO	11018.87
ELSPEZOJ FEDERACIO	4803.30	ELSPEZOJ INFORMILO	8216.86
	-----		-----
PROFITO FEDERACIO	2719.87	PROFITO INFORMILO	2802.01
Havo je la 31 12 88	12488.27		
PROFITO FEDERACIO	2719.87		
PROFITO INFORMILO	2802.01		

Havo je la 31 12 89	18010.15		

La trezoristo :
A. Grossmann

En 1989 ni preskaŭ atingis la nombron de 250 abonantoj al La Informilo. Tio signifas refoja altiĝo, sed ĉi-foje je pli ol 10%. En 1990 ni klopodu superi tiun nombron kun simila procentaĵo. Sed neore ni ne perdu la atingitajn rezultojn. Ĉu tio eblas? Nia bona financa situacio ja ebligas al ni pli efike propagandi.

RADIO-PROGRAMOJ EN ESPERANTO

Vi trovas ĉi-sube ĉiujn aktualajn indikojn laŭ la mezeŭropa tempo. Por trovi la ĝustan tempon en via regiono, konsultu la mapon de tempozonoj en „LA JARO”. Por havi nun la grenviĉan tempon, subtrahu unu horon. Se ne estas aliaj indikoj, la frekvencoj estas en kilohercoj kaj la ondlongoj en metroj. Plejparte temas pri kurtondaj frekvencoj.

gisdatigita 9001/vintre

stacio	tago	horo	kilohercoj	metroj
Varsovio (Radio Polonia) Esperanto Redakcio Poŝtkesto 46 PL-00950 WARSZAWA 1	ĉiutage	6.00- 6.30	9675, 7270, 5995, 1503	31,01; 41,27; 50,04; 200,00
		12.00-12.25	11840, 9525, 5995, 1503	25,34; 31,50; 50,04; 200,00
		16.30-16.55	11815, 6095	25,39; 49,22
		18.30-18.55	9540, 7285, 6135	31,45; 41,18; 48,90
		21.30-21.55	9525, 7145, 7125	31,50; 41,99; 42,11
		22.30-22.55	7285, 7270, 7125, 6135	41,18; 41,27; 42,11; 48,90
			6095, 5995, 1503	49,22; 50,04; 200,00
Bern (Svisa Radio Internacia) Esperantofako CH-3000 BERN 15	lunde		9535, 6165, 3985	31,46; 48,66; 75,28
	ĵaŭde	por Eŭropo		
	sabate	14.30-14.40		
La elsendoj por ekster-eŭropaj regionoj okazas merkrede kaj sabate per direktitaj antenoj okfoje. Petu specialan faldfolion!				
Vieno (Aŭstra Radio) ORF Esperantoredakcio A-1136 WIEN	dimanĉe	5.05- 5.30	6155 Eŭropo	48,74
	dimanĉe	14.05-14.30	15410 Proksima Oriento 13730, 6155 Eŭropo 15430 Malproksima Oriento 21490 Okc. k S.Okc. Afriko, S.Okc. Eŭropo	19,47 21,85; 48,74 19,44 13,96
Vatikano (Radio Vatikana) Esperantoredakcio I-00120 CITTÀ DEL VATICANO	dimanĉe	21.00-21.10	1a Eŭropa Programo	196; 48,47; 48,00; 41,38; 31,10;
	kaj festotage		1530, 6190, 6248, 7250, 9645	
	ĵaŭde	7.00- 7.15	Afrika Programo 1530, 9625, 11700, 15120 2a Eŭropa Programo 1611, 6248, 7250, 9755, 11715	196; 31,17; 25,64; 19,84 186; 48,00; 41,38; 30,15; 25,61
Romo (Radio Roma RAI) Esperantoredakcio C.P. 320, I-00100 ROMA	sabate	21.00-21.20	7275 11800, 9710	41,24 25,42; 30,90
	dimanĉe	23.45-24.00	1125, 1134, 1143	266,4; 264,70; 262,00;
Pekino (Radio Pekino) Esperantofako BEIJING	ĉiutage	21.00-21.30	9500, 9965, 7470	31,58; 30,10; 40,16
		por Eŭropo 23.30-00.00	9480, 11515	31,65; 26,05
		por Latin-Ameriko 12.00-12.30	9480, 6955	31,64; 45,10
		por Japanio kaj Koreio 14.00-14.30	11650, 15165	25,70; 19,78
		por Sud-orienta Azio		
Rio de Janeiro (Brazilia Spiritisma Federacio) av. Passos 30 BR-20000 RIO DE JANEIRO ZC 58 Brazilo	dimanĉe	23.30-23.45	1400	214
Sorocaba (Radio Clube de Sorocaba) Eo-Redakcio, rua de Penha 455 BR-18100 SOROCABA SP, Brazilo	dimanĉe	1.00- 2.00	1080	278
Radio Esperanto Parizo 145, rue Amelot F-75011 PARIS, Francio	vendrede	19.00-20.00	89,5 MHz	en MF(UKW)
Radio Budapest KNAF Eszperantó H-1800 Budapest	dimanĉe	10.50-11.00	69,38 MHz aliregionaj frekvencoj laŭ FM-reto de MRT3	en MF(UKW)
Tallin (Estona Radio) Esperanto-fako SU-200100 Tallin Estonio, Sovetio	ĵaŭde	22.20-22.30	1035; 5925	290; 50,63
	dimanĉe	10.20-10.30	1035, 5925	290; 50,63
Córdoba, Hispanio	sabate	12.00-12.20	94,3 MHz	en MF (UKW)
Radio Havano Kubo Esperanto-Fako Poŝtkesto 7026	dimanĉe	9.00- 9.20	11835 okc. Nord-Ameriko, pacifika Azio	25,35
		18.00-18.30	15340, 15300, 15285, Ameriko 11820, 11760, 11725	19,56; 19,61; 19,63; 25,38; 25,51; 25,59;
		19.30-20.00	17800, 15285, 11800 Eŭropo kaj	16,85; 19,63; 25,42
		23.00-23.20	17800, 15285 Mediteraneo	16,85; 19,63
		23.30-00.00	11970, 11950, 11910, 5985 Ameriko	25,06; 25,10; 25,19; 50,13;
Radio Vilnuso Radio Vilnius Esperanto SU-232674 Vilnius, Litova SSR	marde	00.23-00.28	11770, 12060, 15180, 17665, 17690	25,49; 24,88; 19,76; 16,98; 16,96
Radio FMR Eo-redakcio, 9 bis av. Frédéric Estèbe F-31200 TOULOUSE, Francio	ĵaŭde	23.53-23.58	6100, 666	49,18; 450,45
	merkrede	13.00-13.30	89 MHz	en MF (UKW)
	sabate	10.30-11.00	89 MHz	en MF (UKW)

© MONATO internacia magazino sendependa, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Unu el la multaj bonaj ideoj de MONATO!

nos cotisations 1990

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1990 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

Cat. TABLEAU DES COTISATIONS 1990

	cotis.	abonnem. Informilo
1 = abonnement simple à La INFORMILO		45 F
2 = adhésion simple à la FÉDÉRATION CULT. DE L'EST		
* membre fédéral avec abonnement à La INFORMILO	23 F	+ 45 F
* membre fédéral sans abonnement à La INFORMILO pour les autres membres de la famille par exemple	23 F	
3 = adhésion à la FÉDÉRATION et à l'U.F.E.		
* membre simple	95 F	+ 45 F
* membre actif JEFO moins de 30 ans au 01.01.90	90 F	+ 45 F
* membre actif JEFO Etudiant, chômeur, scolaire, militaire	60 F	+ 45 F
* membre actif UFE avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO"	230 F	+ 45 F
* membre actif UFE conjoint	120 F	
4 = adhésion à la FÉDÉRATION + U.F.E. + U.E.A.		
* membre individuel reçoit "F.E." + guide de l'UEA	270 F	+ 45 F
* membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + (revue KONTAKTO, si moins de 30 ans)	320 F	+ 45 F
* membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + (KONTAKTO, si moins de 30 ans)	455 F	+ 45 F

IMPORTANT

- 1 - Les nouveaux adhérents recevront par courrier séparé leur(s) carte(s) de membre à la Fédération, à l'UFE, à l'UEA, selon les cotisations payées ainsi qu'un exemplaire des status de notre Fédération.
- 2 - Les autres membres trouveront dans le bulletin La Informilo, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 1990, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 1990 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3 - Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES GEE.
- 4 - Les jeunes de moins de 30 ans au 01.01.90, payant leur cotisation de l'UFE ou de JEFO, voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANÇAISE JEFO. Ils recevront alors en plus la revue *Koncize* et le bulletin interne national JEFO informas. Ils auront droit de vote au Comité de JEFO.



? U distrā angelo



René LLECH-WALTER
12, Avenue Général de Gaulle, 78
66000 FERRIGNAN
Tél. 68.34.22.18 et 68.34.54.36
C.C.P. 160.60 C Montpellier

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										
11										

KRUCVORT-ENIGMO

HORIZONTALE

- 1 Por pli bone miksi. 2 elementa peceto - aro da punktoj (r) - specio de bovo (r). 3 Orienta veturileto (r) - kampobrasiko (r) - prefikso.
- 4 Herbo (el komponitoj) (r) - sensoorgano (r).
- 5 Erikeja kreskaĵo (r) - gasomiksaĵo - sufikso.
- 6 Teksaĵo (r) - sufikso - por biliono. 7 Manko de nutraĵo (r) - meti en ies posedon (r). 8 Ne scii (r) - aĝuro. 9 Sen korektoj kaj makuloj (r) - forigu aferon aŭ estajon - malkonsenta.
- 10 Metalo - riĉa, premita. 11 Speciale bleki (r) - venena herbo (r) - veturilo.

VERTIKALE

- 1 Frapi - sufikso. 2 Kurieristino (r) - havanta grandan dimension aŭ daŭron (r) - malgranda elemento. 3 Parto de plugilo (r) - por bredado de silkraŭpoj
- 4 Por sensoifigi (r) - enkonduki (r). 5 Konjunkcio - registara teritorio (r) - paŝado. 6 Senti surprizon metala mineralo - krusta haŭto (r). 7 Prepozicio - ĉefa arterio (r) - ŝirmita. 8 Fumita fiŝaĵo - la plej agrabla ĝardeno (r). 9 Loka adverbo - mezurunuo - rifuza. 10 Memmoviĝi (r) - maljuna (r) - prepozicio - insulo en dezerto.

"SILAB-ENIGMO"

Pere de la ĉi-subaj vort-elementoj alfabete ordigitaj, malkovru la vortojn, kies simpla difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikalaj legataj, elformos proverbon.

ad av ce da de duo eb eg eo er go ido is izo kal ko la le lik lo lo ma mi mo nan ne ne od pi pio po po po ra ra ra ro ser so te ter ti ti to uro va viv

1	+ - - +	filo de l' filo
2	+ - - + -	gardo, protekto
3	+ - - + - -	profesia kunulo
4	+ - - + - - -	celo de la vivo
5	+ - - + - - - -	milita ŝiparestro
6	+ - - + - -	strutosimila birdo
7	+ - - + - - -	kuracrimedo difinita
8	+ - - + - -	edzo de Penelopo
9	+ - - + -	tranĉa ilo
10	+ - - + -	dento-substanco
11	+ - - + - - -	puninda ago
12	+ - - + - - -	specio de loligo
13	+ - - + - -	belkolora insekto
14	+ - - + - -	antaŭ-atentigi
15	+ - - + - - - -	gravurita sur ŝtono
16	+ - - + - - - -	samtemperaturaj lokoj
17	+ - - +	ideala modelo



Ĉu la franca Ministro volus nin "ĉantaĝi"?!?

AIF-

SOLVOJ DE NIA LASTA ENIGMO-KONKURSO

humur-desegnaĵo en L'ECOLE LIBERATRICE

Krucvort-enigmo: *blankec ota fasti rob tineo omaro jodl skeĉ lu are iu luo ok ere aĉ etr ĝibo oer tso egret nea nm nei ritmo op imago ŝim bi*

"Silab-enigmo": *"Proverbo estas sperto, proverbo estas averto"*

Atingis nin 7 respondoj al la finjara konkurso dum la unua semajno de januaro.

Laŭ la ordo de la alvenoj estas premiitaj: Sr^o BLANCHET (52), Sr^o BARRIER (68), Sr^o CHASLE (22) kaj Fin^o MARTIN (88). Ili estas ricevontaj sian libron. Gratulon al ĉiuj!